

William Wordsworth,  
Dafodiloj

*tradukita de Krys Ungar*

Mi vagis sola kiel nub'  
Altfloras super la kampar'  
Kaj tiam tuj aperis trup'  
De dafodiloj; ora ar'  
Apud la lag', sub arba tend'  
Flirtis kaj dancis en la vent'.

Senbreĉe kiel astra bril'  
Sur Lakta Voj' flagretas, jen  
Sterniĝis ili en defil'  
Senfine laŭ la laghaven'.  
Rigardon kaptis la balanc'  
De dekmil kapoj en la danc'.

Apudaj ondoj dancis, sed  
Triumfon gajnis floroj ĉi,  
Devigis gajon de poet'  
Plej joviala kompani':  
Mi rigardadis sen atent',  
Ke min riĉigos la prezent'.

Ĉar ofte, kiam kuŝas mi  
Penseme, aŭ en menslangvor',  
Ekfulmas ili tra l' konsci' -  
La beno de solema hor';  
La koro pro pleniga ĝu'  
Kun dafodiloj dancas plu.

*Traduko de la Angla poemo "The Daffodils" de WILLIAM WORDSWORTH (\*1770 - †1850) en Esperanton de KRYS UNGAR (Krys Bott-rill).*

*Arg-39-632 (2009-09-20 15:01:36)*

William Wordsworth,  
Die Narzissen

*tradukita de Hans Hennecke*

Argiope-informo:  
La aspekto de tiu ĉi versio estas barita.  
Supozeble la aŭtoro decidis tion.

*Traduko de la Angla poemo "The Daffodils" de WILLIAM WORDSWORTH (\*1770 - †1850) en la Germanan de Hans Hennecke.*

*Arg-39-75 (2004-02-01 18:36:59)*

*Germanigo de la origina anglalingva teksto de WILLIAM WORDSWORTH, fare de Heneko, Johano (HANS HENNECKE). (Mi trovis tiun ci poemon en la libro „Snapshots of Britain“ / „Britannien in kleinen Geschichten“, rakontita de JOY BROWNING, eldonejo Deutscher Taschenbuchverlag, ISBN 3-423-09319-6.)*